

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.
Semajna esperantista ĵurnalo, aperos post 1 decembro 1924 dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburg
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 217
9. 11. 1924

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin. L. K.
Administracio:
Horrem b. Kōln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fk. por landoj, kies valuto
suferta maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
ĉe „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburg, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa.

La lando Luksemburgo kaj ĝiaj aspektoj.

Estas maloftaj la landoj, kiuj sur tiom malgranda spaco — pli malmulte ol 3000 kvadratkilometroj — prezentas tiun variecon da pejzaĝoj kaj naturriĉaĵojn de tia beleco. Akro kaj malriĉa belaĵo en la nordo; mola, gracia kaj ondanta ebenaĵo en la sudo: hieraŭ vi restas revema antaŭ profunda valo malkulturita, sur kiu malnova kastelo starigas siajn melankoliajn turojn, kaj hodiaŭ vi estas en la regiono de la ŝtalo, inter la sur ĝia bruo de ĝiaj altfornoj, en unu el la plej riĉaj industriejoj de la mondo; morgaŭ vi estos apud la vinejoj de la Moselo, kies ondoj murmuras gajan lulkanton.

Ĉirkaŭ tiu centra kerno en la trairejo de la nacioj, la galoromana kaj la germana raso kristalligis tie en lingvoj, genioj kaj institucioj kontradiktaj depost la migrado de la popoloj. Tiu graflando, sendependa sub Sigefroi d'Ardenne je la mezo de la X-a jarcento, baldaŭ poste duklando, konis gloran historion, donante reĝinojn al Francujo kaj imperiestrojn al Germanujo. Forta placo de unua rango, ĝia ĉefurbo estis dezirata de siaj najbaroj en oriento kaj okcidento, kaj tiel ĝi partumis la destinojn de Burgonjo kaj Francujo, de Hispanujo kaj Aŭstrio ĝis al la momento, kiam post pluraj partiĝoj ĝi retrovis politikan sendependecon dum 1867 okaze de rompiĝo de siaj muroj.

La urbo Luxemburg ironas alte sur nealireblaj rokoj, pikitaj de la franca konstruistaro Vauban per fortikaĵoj iam mondfamaj. Kiam en direkto de Fechenhof la turoj kaj frontonoj profilas siajn strangajn dentojn en la aero, la malnovaj domoj abrupte konstruitaj sur la remparoj havas la strangan minon de objektoj memorantaj La urbo konservas de tiu ŝtona pasinteco precize sufiĉe por miksi al sia natura beleco la grandon de pasinteco. Kiam vi fordonos vin al la ĉarmo de vagabondado, vi estos kapita de la fortegaj kontastoj de la linioj kaj de la lumo, kaj vi haltos reveme en la ombro de tiuj turoj kaj muroj.

Ĉirkaŭ la ĉefurbo idiliaj valoj kaj fervojoj radias al la kvar punktoj de la horizonto: al Trier kaj Germanujo en la oriento, Thionville (Diedenhofen) en Lotaringio kaj Longwy en norda Francujo sude, Arlon kaj Bruxelles kaj la belga marbordo en la okcidento, Liège kaj la Rejnlando en la nordo. La modernigo de la malhela fortifikaĵo, nun gaja urbo vivoplena, daŭriĝas per metodo kaj rapideco admirindaj. Ĝiaj luksaj vendejoj ne postrestas malantaŭ tiuj de la fremdaj grandurboj, kaj ĝiaj hoteloj, kies kuirejo estas ire ŝatata de la bonmanĝemuloj, kaj en kies ĉambroj mankas ĉiam malpli da komforto, baldaŭ povos rivali kun tiuj de la plej famaj turistaj centroj. La amanto de publikaj monumentoj kaj belartoj admiras la granddukan palacon en hispana renesanca stilo, la ĉefpreĝejon (katedralo) el la komenco de la 17-a jarcento,

la muzeojn, la karakterizajn viaduktojn, la novan ŝtonan ponton, superanta la profundan valon de la rivereto Peirusse, nun belega parko, per unu arko 87 metrojn longa, la kontorpalacojn de la „Arbed“, plej granda industria entrepreno de la lando; la amanto de sporto kaj fizika kulturo trovas vastan kursejon, multajn aŭtogaraĝojn, luksan urban naĝbanejon; la komercisto kaj industriisto — dekdu bankojn, plej modernan poŝt-administrejon kaj metiian laborejon E. Meŝ antaŭ la urbo; kiu amas ripozajn enmeze de grandaj arboj kaj florantaj gazonoj — la mirindan parkon; kiu preferas distraĵojn — la koncertojn de la soldata orkestro, de multaj kafejoj kaj pluraj kinematografejoj.

De la ĉefurbo al la plej distancaj lokoj de la lando estas nur paŝo: aŭtomobiloj kaj societaj veturiloj en granda nombro sur stratoj en bona stato, fervojoj je larĝa kaj mallarĝa relaro transportas la vojaĝantojn en ĉiun direkton kaj al la plej diversaj panoramoj. El la ĉefurbo vi vizitos la industri-urbojn kun ilia kolosa bruo, aŭ vi sekvos norde la valon de Mersch, kie vespere, laŭlonge de montetoj, violkoloraj nuancoj fandiĝas al la vaporoj transvideblaj sin levantaj el la malrapida rivero „Alzette“, pri kiu nacia kanto diras: Kie A'zeto transiras herbejojn Aliaj

Esch a. Sûre, Burscheid, Brandenburg, Vianden, Clerf. Kiu priskribos ilian tragikan brilon kaj nian bedaŭron, kiam aŭtute iliaj turoj aperas antaŭ ni, orumate de la vespera suno!

Por iri al la ŝtata banejo Mondorf sur la bordo de la Moselo, se vi ne posedas komfortan limuzinon (vojaĝaŭtomobilon), prenu la mallarĝvojan vagonaron dekstre de la ĉefstacio (monumenta konstruaĵo kun alta horloĝturo), kiu transportas vin tien en malpli ol unu horo. En parko, mirinde lokita je duona alteco de la riverbordo, vi povos trinki la mineralan akvon venantan el la profundajo de pli ol 700 metroj, kies bona efiko sur la „digesta aparato“ estas atestita de plej kompetentaj medicinaj aŭtoritatoj kaj per ĉiujare pligrandiĝanta klientaro. Hidroterapia kuraco en Mondorf krome ne estas sen ĉarmo: la parko kun siaj terasoj estas ampleksa kaj bone zorgita; kiam vi ŝatas naĝadon aŭ remadon, zingaj neĝejoj kun ferena akvo kaj la limformanta rivero; kiam vi preferas alispecajn distraĵojn, jen kortoj por teniso, ludejoj por infanoj kaj plenkreskuloj, koncertoj por ĉiul. Kaj hoteloj por diversaj monujoj ne mankas. De Mondorf promenado unuhora tra arbaro kaj vinejoj kondukos vin al la bordoj ridantaj de la Moselo, kiu formas la limon inter Luksemburgo kaj la Rejnlando. Vi trovos en tiu

mosela valo, prikanfita jam de Aŭsonius de Bordeaux, la koketajn urbojn Remich (kontraŭflanke al la romana mozaiko de Neunig) kaj Grevenmacher kun ĝiaj fabrikoj de vino ĉampana, la pitoreskajn vilaĝojn Ehnen kaj Wormeldingen, famaj pro siaj vinoj. La ŝoseo akompanas la riveron ĝis Wasserbillig, kie la „akvo estas malmultekosta“ pro ĝia situo ĉe la kunfluo de la Sûre (Sauer) kaj la Moselo, kiu lasta pro la granda alfluo direktas sin nun nordorienten al la antikva urbo Trier (Treviris, je duonhora distanco) por verŝi sin, post fluo tra rave bela kaj vinriĉa valo, apud Koblenz en la Rejn.

Kiam de Wasserbillig vi suprenveturas, nun per aŭtomobilo aŭ fervojo, la fluon de la Sûre, kies klarajn akvojn amas la ezoko kaj la rejnismo dum aŭtuno, vi alvenas al Echternach kaj la valo de la muelistoj. Kun monaĥejo de



(Supre:) *Vidaĵoj el la urbo Luxemburg.*
Foirejo kun monumento de grandduko Vilhelmo II-a, reĝo de Nederlando.
(Malsupre:) *Malnova enirejo al la urbo dum vintro.*

(Supre:) *Malnova pordego sur la strato al Trier kun vidaĵo al la supra urbo.*
(Malsupre:) *Ĉefa stacio.*

valoj malfermiĝas dekstre kaj maldekstre — apenaŭ rimarkite ili jam malaperas —, kie misteraj riveretoj promenans je tordita fluo inter densaj arbaroj: ĉie je turniĝo de la vojo ekaperas belaj malnovaj kasteloj kaj ni dezirus plilongigi la fugantan ekvidon de neforgesibla dekorato. Ĉiuj valoj estas tiaj, tiu de la Our, Clerf, Ern, kaj tiom da aliaj, torditaj, sovaĝaj kaj de mirinda melankolio. De roka altaĵo vi aŭdas la klakadon de mueliloj kaj la monotonan babiladon de la ŝaŭmanta akvo apud la bariloj. Kaj suprenirante pluen vi malkovros neatenditan amasigon de montoj, implikaĵojn de mallumaj valoj kaj blankajn vilaĝojn sur la altaĵoj. Super ĉio ĉi la neŝanĝebla trankvilo de vastaj solajoj. Subite, meze de mallumaj arbaroj aŭ sur grizaj rokoj, leviĝas la fantaziaj ruinoj desegnitaj de Viktor Hugo:

Benediktanoj fondita dum 7-a jarcento de Sankta Willibrordo kaj nun uzata kiel gimnazio, ĝia baziliko de pure romana stilo de la 11-a jarcento kaj tenanta blankmarmoran sarkofagon de la sanktulo, ĝia urbdomo ĉirkaŭita de turoj (Dingstuhl), ĝiaj malnovaj domoj kun pordejoj skulptitaj dum alia epoko, Echternach estas la plej malnova kaj plej pitoreska el niaj urboj. Tie, en stratetoj de stranga nomo, sur remparoj kaj laŭlonge de profundaj ĝardenoj ĉirkaŭitaj de altaj muroj, sur la mirinda grandplaco kie vin mirigas la sono de via paŝo, vi romantika vojaĝanto estos en la pasinteco. Famekonata tra la tuta kristanaro Echternach estas ankaŭ pro sia „dancanta procesio“, okazanta ĉiujare la mardon post Pentekosto je honoro de Sankta Willibrordo, unika kaj kortuŝa vidaĵo, kiun ĉeestas miloj da rigard-

antoj kaj dancantoj, kiuj tenas sin je la mano kaj dancas por alvoki Sanktan Guy (Blasius) ĉi paŝojn antaŭen kaj du malantaŭen, sub sonado de ĉiam ripetata speciala melodio, ludita de flutistoj kaj violonistoj en la proceso.

Echternach prezentas ankoraŭ alian nekompareblan altiraĵon, ĉar ĝi estas la enirejo de la „valo de la muelistoj“, geologie plej interesa, kiu transportas vin en alian teropkon. La „lupo-trairejo“ superregnas la urbon, aliaj rokaj formoj kaj akvofaloj, dissemitaj tra vasta arbaro, donas ĉiam novan vidadon al la miranta okulo. Enmeze de tiuj mirindaj la grandaj vilaĝoj Beaufort kaj Berdorf kun hoteloj instalataj por restado de turistoj, donas al la vojaĝanto ĉiun dezireblan komforton. En Beaufort troviĝas imponaj ruinoj de malnova kastelo.

De la abatejo Echternach la fervojo kondukas vin al Diekirch, la lulilo kaj centro de la turismo en Luksemburgo. Sed la ŝoseo tra la mallarĝa valo de la limformanta Sûre estas same agrabla, kie arbariĉaj montetoj spegulas sin de ambaŭ bordoj. Apud Wallendorf, kunfluejo de Our kaj Sûre, la valo plilarĝiĝas kaj la rivero sin turnas al interno de la lando en la direkto de Diekirch. Tiu ĉarma urbeto kuŝas piede al la impona montaro Herrenberg (500 m alta), rigarde al kelta dolmo „Deiwelselter“, altaro de la diablo, kies malhela maso tronas sur la maldekstra bordo de la fiŝriĉa rivero; ĝia bierfarejo estas fama konata ekster la limoj de la lando kaj ĝiaj hoteloj tre ŝatataj de la turistoj. La ĉirkaŭaĵo de Diekirch ne mankas je altiraĵoj: sudokcidenten kondukas bona aŭtomobilstrato al la malgranda urbeto Fels (Larochette=roketo) kun ruinoj de malnova kastelo; norden alia je la altajtoj de Hosingen, kiu permesas rigardojn de pitoreskaj eltraŭcoj neforgeseblaj kaj sur panoramojn de malofta beleco. Tiaj estas „la seĝejo de la predikanto“ inter Michelau kaj Kippenhof, la ruinoj de la kastelo Brandenburg kaj Burscheid. Mallarĝa fervojo kondukas al Vianden, kies kastelo estas la plej malnova kaj samtempe la plej vasta kaj plej bone konservita de la lando kaj formas turisman trezoron de malofta beleco. Ĝi estas lokita sur roka monteto, naskejo de la regnanta familio Orange-Nassau, kaj kun sia kasteleto kapelo renovigita, sia bizancia salono, tiu de la kavaliroj, sia donjono (defenda turo), siaj kaŝejoj, sia puto, ĝi superstaras la urbeton kuŝantan je ĝia piedo, kie vi trovas malnovan dunavan preĝejon kaj, apud la Our je la ponto, loĝejon kiun okupis la fama poeto Viktor Hugo dum la lastaj jaroj de sia ekzilo. Pli alte de la rivero serpentumanta tra grandioza valo, troviĝas la kastelo Falkenstein kaj Stolzenburg, kie estas forlasita minejo de kupro. La sociala asekuro de la lando nun konstruas grandan sanatorion en tiu regiono, konsiderata de specialistoj kiel la plej saniga de la sana landeto.

Kelkajn mil metrojn okcidente de Diekirch, ĉe enfluo de la Alzette — tria river-artero de la lando — en la Sûre, kuŝas la komercista kaj rozeja urbo Ettelbrück, interkrucado de pluraj fervojaj linioj. En duonhora apudeco vi trovas la modernan kastelon Colmar-Berg, nun somerrestadejo de la grandduka familio. Suprenirante la Sûre ĝis Goebelsmühle kaj Kautenbach, piedire aŭ fervoje, vi trairas valon je pli intensa pitoresko kaj je plej variaj aspektoj. Tie vi estas sur tereno de ardezaĵ formoj kronitaj de junaj kverkaĵoj, kiuj markas la eniron de la Ardenoj kaj limon de la geologia formajo „devona“, kies genisto je oraj floroj estas la plej koloriga kaj signifa ornamo.

La fervoja linio de Ettelbrück al Troisvièges (Ulflingen), traboranta per multaj tuneloj la ardezaĵ montarojn, kiuj devigas la Sûre kaj ĝiajn alfluojn Wilty kaj Clerf, je kapricaj serpentoj, trairas la centran akson de la Ardenoj. Por alveni al Esch apud Sûre ĉe la ŝoseo subiras tunelon sub kresto de rokoj, kiuj ĉirkaŭas rondde la urbeton kuŝantan sur duoninsulo en vera turo kun sia masiva ruino de malhela kastelo, kies konstruo datumas de la krucmilitiro. Revenante al Goebelsmühle vi sekvas la Wilty ĝis al la urbo de sama nomo, kies kastelo estas duone modernigita kaj daŭre loĝata, kies modernaj ledfabrikoj riĉigas ne nur la posedantojn, loĝantojn en luksaj vilaĝoj, sed ankaŭ la tutan loĝantaron. Kaj ne forgesu viziti la abatejon Clerf, kie vi admiras juvelon de malnova kastelo kun tureteto el mezepoko, belan romanon preĝejon, nove konstruita antaŭ nelonge, kaj la vastajn konstruaĵojn je ruĝa tegmento de la benedikta abatejo, kiuj salutas vin de supra plataĵo.

Revenante al la centro de la landeto vi trairas Mersch, kuŝanta sur verda tapiŝo je la idiliaj bordoj de la Alzette. Tie la valo fariĝas impone larĝa; ĝi estas trasemita je riĉaj vilaĝoj, dispartumitaj en la herbejoj kiuj juveloj kaj enkadriitaj de arbaraj montetoj kaj malproksimaj bluajoj. En la kantonurbo Mersch mem vi rimarkos izole starantan masivan turon en apudeco de impona preĝejo kaj malnovan kastelon, kie nun mastrumas besfarmisto. Dekstre, inter valo, kuŝas Fischbach, kie unue oni klopodis fandi feron, kaj Meysemburg kun fiera silueto de kastelo de grafo Arensburg, ne malproksime de Fels. Ankaŭ alfluas ĉe Mersch la Eich, trairanta mirindan valon kun vinditaj rokoj, kasteloj Hollenfels, Ansemburg,

Simmern kaj monaĥejo Marienthal, kiu etendas sin ĝis al Arlon, kaj la Mamer; tiu valo kondukas tra lokoj je mirinda beleco preter Schoenfels kaj Kopstal (tie estas specialaj plantaĵoj de salikoj de la ĉampanfabriko Mercier en Reims kaj Luksemburg) ĝis al la pordoj de la ĉefurbo.

Sed la ĉefajo de la lando ne estas ĝiaj valoj kaj montetoj, kiujn admiras la turistoj amanta idiliojn aŭ sovaĝajn belecojn. La industrio en la sudokcidenta parto postulas nepre nian atenton. Kontraste al la pitoreska paco de aspektoj admirataj alilparte, ĝi etendas sian krudan belajon kreitan per la minerala riĉeco de la ruĝa tero. Ne malpli ol 47 alfornoj je ruĝanta fumo laŭte eldiras kanton de senĉesa laboro utila; la larĝaj konglomerotoj de Esch a. Alzette, Dudelange kaj Differdange, iom pli malproksimen Steinfort populamasi tiun minajn basenon, unu el la plej imponaj en Eŭropo. La beleco de tiu regiono estas forta je konscia povo kaj glorado de laboro. Sole la minejoj de Arbed, de Ruĝa Tero kaj Hadir komponas pli ol duonon de la nacia riĉeco de la grandduka lando.

Forkurante el tiu bruaĵo, kiu tamen kaptas vin, vi ripozos en la valo de la Moselo, kie vin ebrigiĝas la ĉarmo de ĝiaj montetoj kaj la bongusto de iliaj vinoj kaj brandoj, kontraŭ-alkoholulojn eble la akvo de la termo-fontoj en la ŝtata banejo Mondorf, malfermita de majo ĝis oktobro. Vi gustumos la trankvilan ĝojon de vivado sur tiu bordo kaj komprenos, kial jam romanoj amis tiun valon kaj deziris morti tie.

Luksemburgo, lando de rozoj (la jara eksporto superis iam 4 milionojn da frankoj) estas ankaŭ lando de fruktoj, unuavice kulturitaj grandstelo en la valo de la Moselo kaj de ĝiaj alfluoj. Alilparte grandaj arbaroj — iam monstraj, kiuj donis al la lando dum franca regado la nomon „departemento de la arbaroj“, kovras ankoraŭ nun trionon de la supraĵo. Ila harmonia dispartigo prezentas plej bonajn vivokondiĉojn al ĉiuspeca ĉasaĵo, la klaraj riveroj al trutoj kaj salmoj, kune kun belaj vojoj kaj bonaj surskotoj tiom da ravantaj trezoroj por ĉiuspeca turistoj kaj sportistoj.

Por ĉiuspeca informo oni direktu sin al la S. I. T. E., oficiala informejo por turismo kaj vojaĝo, ĉe banko Werling, Lambert & Cie., Luksemburg, Aldringerstr., aŭ al la delegito de UEA, H. J. Hoen, Luksemburg, Parisa Placo (magazeno Hoen-Denis).

Historio de Luksemburgo.

Komence simpla sinjorejo, poste graflando, Luksemburgo fariĝis duklando en 1354. Pluraj el ĝiaj ĉefoj estis elektitaj imperiestroj de Germanujo, de kiuj la lando dependis. Unu el ili, Johano la Blinda, reĝo de Bohemlando, mortis dum la batalo de Crey en 1346 batalante por Franclando, kies influo estis plej granda dum la epoko de la grafoj kaj dukoj. En la jaro 1440, la kapetido (de la dinastio Capet) Filipo la Bona, duko de Burĝonjo, alimilitis Luksemburgon kaj faris ĝin dependa de sia franca lando. Post la morto de Karlo Aŭdaca ĝi falis al la hispana branĉo de la domo Habsburg. Sed la franca reĝo Francisko I-a alimilitis ĝin dum 1543 kaj ekposedis ĝin por du mallongaj tempospacoj. Ludoviko XIV-a rekonkeris ĝin dum 1684 kaj okupis ĝin ĝis la paco de Rijswick 1697, kaj dum lia regado la fama konstruistaro Vauban transformis la ĉefurbon en plej forlikan placon de Eŭropo. La civila administracio estis lerta kaj bonfaranta. Tial Ludoviko estis entuziasme akklamata de la loĝantaro okaze de persona vizito dum 1687. Redonite al Hispanujo dum 1697, la dukojo transiris al Aŭstrio per la traktadoj de Ulrecht (1713) kaj Rastatt (1714) kaj restis tie ĝis la franca revolucio. Dum la burĝonja, hispana kaj aŭstria regadoj la luksemburganoj ĝuis efektivan aŭtonomion, kaj kun la Nederlandoj, al kiuj ili apartenis laŭ politikaj vidpunktoj, ili havis nur vagajn rilatojn.

De 1795 al 1814 Luksemburgo apartenis al la franca respubliko kaj imperio, formante la „departementon de la arbaroj“. Ĝi elkreskigis avantaĝe sub la francaj leĝoj ĉiujn elementojn de sia prosperado. Napoleono postvivis en la memoro de ĉiuj luksemburganoj, kaj lia regado markas ĉe ni kulminacian staton de Francujo. La konferenco de Wien de 1815 faris la malnovan duk-ejon grandduklando, sed rabis al ĝi grandan parton de ĝia teritorio. Ĝi estis atribuita al la dinastia domo Orange-Nassau, kies ĉefo estis Vilhelmo I-a, reĝo de Nederlando, kaj formis person-union kun tiu regno. La nova granddukejo tamen estis membro de la Germana Federacio, kaj ĝia ĉefurbo, federala fortika placo, devis akcepti germanan okupaci-armeon.

Dum 1830, Luksemburgo asociis sin al la revoluto de la belgoj kontraŭ la holandanoj; la belgoj okupis la landon ekskluzive la ĉefurbon (kiun la prusoj gardis bone) ĝis 1839, kiam la konferenco de London partumis la landon egale inter la belgoj kaj la dinastia domo Nassau, kiu retenis la orientan parton, dum la pli granda okcidenta, kun ok aliaj provincoj, formis la novan ŝtaton Belgujo.

Denove malpligrandigite, Luksemburgo daŭris aparteni al la Germana Federacio kaj partoprenis en la germana dogan-unio „Zollverein“. La Federacio dissolviĝis post la krizo de 1867, tamen la prusoj ne forlasis la forlikan placon, ĝis nova konferenco en London, post kiam Napoleono III-a sensukcese klopodis reakti la malnovan departementon al Francujo, garantiis la daŭran neŭtralecon de la granddukejo. La prusa garnizono foriris, kaj la fortifikacioj estis plejparte detruataj. Dum la sekvantaj militoj inter Francujo kaj Germanujo la luksemburga registaro observis striktan neŭtralecon.

Post la morto de grandduko Vilhelmo III-a, reĝo de Nederlando, mortinta dum 1890 sen virseksa heredonto, la person-unio kun Nederlando estis dissolvita, ĉar leĝo malpermesis regadon al la nuna reĝino Vilhelmino. Grandduko fariĝis Adolfo de Nassau, eksduko de Hessen-Nassau konkerita de Prusujo dum 1866. Car lia filo Vilhelmo IV-a same ne postlasis filon, sed nur ses filinojn, la luksemburga deputitaro ŝanĝis la la malnovan leĝon por transdoni la granddukan ĉapon al lia plej aĝa filino Adelalde, kiu needziniĝinte abdikis dum 1919 kaj mortis dum 1925. Nuna grandduko estas la dua el ses fratinoj Charlotte, edziniĝinta al Princo Felix de Bourbon-Parme, de kiu naskis filo princo Jean la 5-an de januaro 1921. H.

La Zamenhof-Monumento estas preta. Ceremonio en Aberdeen.

Ceremonio interesa por tutmonda esperantistaro, kvankam modesta, okazis en Aberdeen sabaton la 25 oktobro.

En la korto de la granda granitlaborejo, kie la monumento de Zamenhof estis skulptiita, staris, sur sabla monteto speciale aranĝita por la okazo, la helgriza granita monumento destinata por la tombo de nia Majstro. Ĉi tie ĝi elrigardis en nobla aspekto el la amaso de la diversspecaj krudaj granitrokoj, kiuj kuŝis ĉirkaŭe. La ronda terĝlobo sur la supro estis kovrita per verda standardo kaj la monumento ĉirkaŭis aro da esperantistoj: la anoj de la Aberdeena Grupo Esperantista, s-o Warden kaj s-o Page el la Organiza Pormonumenta Komitato kaj J. D. Applebaum, ĝia honora sekretario. La lastaj tri speciale veturis al tiu urbo por la ceremonio.

La monumento estis liberigita de la skulptista ĉizilo antaŭ kelkaj tagoj kaj estas komplete finita por enŝipigo, kaj la Org. Kom. kune kun la lokaj samideanoj kaptis la okazon solene honori antaŭ ĝia enŝipigo por Polujo la ŝtonon, kiu post nelonge kovros la tombon de la Majstro.

S-o Warden en kortaŭaj vortoj rakontis pri la laboro de nia Majstro en sia idealisma agado por la bono de la homaro, detalis la historion de liaj verkoj, kaj memorigis pri la unuaj tagoj de la Universalaj Kongresoj kaj Esperanto. La tuta rondo kantis la himnon de Espero, kaj s-o Page, post aludo al la paca laboro de la kreinto de Esperanto, deklamis „La preĝo sub la verda standardo“.

Poste parolis la honora sekretario kiu montris la universalecon de Esperanto per la fakto, ke mondonacoj venis el la tuta terĝlobo, kaj esprimis la esperon, ke ĉi tiu ŝtono estu por ĉiuj ĉeestantoj simbolo de inspiro kaj instigilo al plua laboro por la bono de nia movado ĝis fina venko.

Do, post longa atendado la monumento por la Majstro estas realajo. Ĝi foriros per la plej proksima vaporŝipo sur la baltika maro al Danzig, kaj de tie al Varsovio por fina starigo sur la tombo. La aberdeenaĵ matenaj kaj vesperaj ĵurnaloj raportis en longaj artikoloj pri tiu unika ceremonio en sia granita urbo, pri kiu ili tre fieras.

Niaj aberdeenaĵ samideanoj, speciale s-o Lawton, la grupa vic-prezidanto, kiu loĝas apud la laborejo, staris dum la ceremonio kun pezaj koroj. Dum multaj monatoj ili drolotis la monumenton kvazaŭ propran infanon, vizitis la laborejon tiom ofte kiom eble por alrigardi al la progreson de la laboro. Ili vidis la krudajn ŝtonojn, observis la ĉizilon, kiel ĝi daŭradis glatumi la krudajn kaj ŝanĝi la graniton je la monumento, kaj nun ili devas perdi ĝin el sia mezo. Kordoloro, tamen kontenteco, ke baldau ĉi tiu monumento kovros la honoran lokon da tero tie en Varsovio.

J. D. A.

Ni bezonas ĉiam

aktualan materialon

(mallongaj originaloj aŭ tradukoj praktikaj el diversaj steroj)

Interesatoj bonvolu subteni nin aktive.

Por Esperanto kiel klara telegrafa lingvo.

Paris, 2 nov. La Prezidanto de la Parisa Komercia Ĉambro sendis oficialan leteron al la Ŝtata Subsekretario pri poŝtoj, telegrafoj kaj telefonoj, petante ke la Franca Registaro konfirmu la deziresprimon de la 5-a kunveno de la Ligo de Nacioj pri la akcepto de Esperanto kiel klara telegrafa lingvo. La.

Helpokrio el Wien.

Nekredebla fakto: La XVI-a rezultigis deficiton de 3000 dolaroj.

En sia raportoj pri la XVI-a nia ĉefredaktoro jam aludis pri deficiito, kiun rezultigis la kongreso; sed li nomis tie la sumon de nur (!) 1000 dolaroj. Nun la L. K. K. dissendas malesperan helpokrion al la tutmonda gesamdeanaro. La plej nigraj limoj estas superitaj: la deficiito sumiĝas je 214 miliono da aŭstraj kronoj, t. e. 16000 svisaj frankoj, aŭ 12840 oraj markoj, aŭ 3000 dolaroj!

La helpopeton de la L. K. K. subtenas s-oj Prof. D-o Carl, J. R. G. Isbrücker, Generalo H. Sebert, D-o A. Steche kaj J. M. Warden. Ankaŭ nia redakcio aliĝas al la subtenantoj de la peto de la L. K. K.; sed ni ne povas preterlasi, esprimi nian miregon pri tiu neaŭdita deficiito de universala kongreso.

Kiu partoprenis la XVI-an kaj vidis la tieajn aranĝojn, tiu simple ne povas imagi, kio englutis tiun teruran sumegon! La L. K. K. diras en sia preskribo, ke ĉefe la amuzaj aranĝoj kaŭzis la plej grandajn elspezojn. Rememorigante al si la amuzajn aranĝojn de la XVI-a, oni povas nur diri, ke — escepte la teatra prezentado, kiu estis vere bona, kaj la festkoncerto — la ceteraj amuzaj aranĝoj ne multe valoris. La kabaredaj prezentadoj estis sufiĉe dilantaj, kaj la speciala varieteo en Prater estis nur por malmultaj spektantoj. La tradicia kongresa kostumbalo tute ne okazis, kaj la interkonatiĝan vesperon, kiu anstataŭ en bela salono aŭ ĝardeno okazis sur ŝtuparoj kaj en koridoroj, oni jam finis je horo, kiam alie la vera festhumoro kutimas nur komenciĝi: oni estingis la lumon kaj tiamaniere devigis la kongresanaron forlasi la kongresojn. Pro ĉio-ĉi ankaŭ ne estas mirige, ke la plimulto de la kongresanoj aliloke serĉis tion, kion ili ne sukcesis trovi en la kongreso, kaj tiel elspezis sian monon en alian anstataŭ en la kongresan kazon.

Malgraŭ la financa malsukceso de la amuzaj aranĝoj la alteco de la deficiito restas enigmo, kiam oni vidas precizajn ciferojn en la bilanco. Najnas, ke ĉe la elspezoj regis simila konfuzo, kaj regis ĉe aliaj kongresaranĝoj kaj kia regas ankoraŭ nun koncerne la adreson de L. K. K. La konverto dissendita al la gesamdeanaro por helpo al la kongresa kazo enhavas tri foliojn: de ĉirklulerojn kaj unu respondilon. Sur la ĉirklulero estas indikita kiel adreso de L. K. K.: Wien 56. Sed sur la respondilo staras eksprese: Uzu ĉiam nur la adreson Esp. Kongreso Wien VI, Mollardgasse 551 Pro malbona sperto ni, male, konsilas al ĉiu samideano, nepe ne uzi la lastenomitan adreson; ni mem uzas ĝin depost monatoj, sed depost monatoj ni vane atendas respondon. Sekve ni supozas, ke tiu ĉi adreso ne plu validas.

Do, konsiderante, ke la deficiito tamen estas fakto, kaj konsiderante la alian fakton, ke la XVI-a devis goĝigan efikon sur la eksteran publikon (ekzemple, ĵus estis malfermitaj en Wien kursoj por pli ol 400 urb-oficistoj!), ni subtenas ankaŭ laflanke la peton de la L. K. K., kiu en sia embarraso nun ne scias kion fari.

Helpu ĉiu laŭ povo, kaj helpu tuj!

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligojn (ĉir postskribo aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciligoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legibile (precipe nomoj).

Legu almenaŭ unufoje ĉi-suprajn kvin liniojn kaj aŭ laŭ ili! Alie ni ne povos publikigi viajn raportojn!

Eŭropo.

Anglujo.
London. La unua ĵarkunveno de Laborista Esp. Klubo okazis ĉe 144 High Holborn, 24. okt. La sekretario raportis pri la bonstato de l' klubo; multaj alilandaj samideanoj vizitis la klubon dum sia estado en London. Ni jam havas ŝakan grupon kaj intencas komenci novajn esp. kursojn por komencantoj kaj progresintoj.

Aŭstrio.
Wien. Post anonco en fakrevuo „Der Städtische Anstalt“ (La urb-oficisto) anoncis sin 450 p., por kiuj estas aranĝataj 5 kursoj. Komitato estas fondita por fondo de „Esp. Laborkomuneco de Wienaj Urb-oficistoj“. Jen oni sentas la bonan efikon de la XVI. R. M. F.

Ĉeĥoslovakio.
Ĉ. Budějovice. La Laborista Akademio aranĝis la 20. 10. en Labora Domo lumbildan paroladon en ĉeĥa lingvo „Pri Mondekspozicio de Wembley“ kaj „Pri Signifio de Esperanto“, kiun faris k-do J. Peh el Plzeň. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj.

La 26. 10. estas malfermita kurso por komencantoj (30 p.), gvidas s-oj V. Verner, del. de UEA, kaj J. Ploss.

Mladé (apud Ĉ. Budějovice). Esp. kurso gvidata de s-o J. Ploss en la vilaĝelege.

Hermannseifen. Post elmeto de alvoko en kesteto anoncis sin 26 p. por kurso, al kiu poste aliĝis pluaj 12 p. Instruas s-o R. Schönwälder.

Přerov. La 9-a kunveno de nordmoraviaj esperantistoj okazis la 19 okt. 1924 en Přerov en restoracio de akc. bierfarejo. Partoprenis reprezentantoj el la urboj Holešov, Kroměříž, Olomouc, Přerov, Prostějov kaj Zlín. Prezidis s-o Kudela el Olomouc, protokolis s-ino Grauerová el Přerov. S-o Kudela raportis pri la rezultato de kunveno de orientbohemiaj esperantistoj en Chocet. Diskutataj estis la demandoj: Plifortigo de UEA per verbo de novaj membroj kaj delegitoj. Financa subteno de naciaj esp. centroj, la nove projektata radio-establiĝo, ĝia signifo kaj monsubteno, tutmonda komerca adreso kaj varbado por ĝi, la 17-a Univ. Kongreso de Esperanto, la 3-a ĉsl. kongreso dum pentekosto 1925, pli efika organizo regiona. Kiel adresaristo kaj regiona kasisto estas elektita s-o Malík el Přerov. La 10-a kaj jubilea kunveno okazos la 14. 12. okaze de la datreveno de la naskiĝtago de nia Majstro en Olomouc en klubejo. A. K.

Estonio.

Esperanto ĉe estonia laboristaro.
Ĝis la fino de l' pasinta jaro, kiam en Tallinn (Reval) fondiĝis „Laborista Esperanto-Socio“, Estonio staris tute flanke de la lastempe rapide progresanta proletaria esperanta movado. Malgraŭ diversaj malhelpoj la socio progresis kaj esperigis sukcesan agadon.

La en januaro okazintaj konfliktoj kaj la sigelformo de la laborista centroje malfavore influis la movadon, kaj la socio, senigite de l' kunvenego, estis perdinta preskaŭ ĉiujn enojn. Tamen novaj kursoj estis aranĝataj kaj fine, post dumonata interrompo, la agado rekomeniĝis.

Nuntempe L. E. S. havas ĉ. 60 anojn, el kiuj multaj jam sufiĉe bone parolas Esperanton, kaj posedas sufiĉe riĉan bibliotekon. Dum la kunvenoj, okazantaj ĉiuvendrede en societa ĉambro en la Laborista Domo (akcia entrepreno de lokaj laboristaj organizoj), oni paroligas la novulojn kaj aranĝas mallongajn raportojn kaj diskutojn. En la agado legio troviĝas gazeto „Vilker-Spiegel“, kaj estas elpendigata ĉiusemajna „murgazeto“ (priesperanta informilo), kiu bone aliras la atenton de la vizitantoj. Malgraŭ malfavoraj tempoj la movado progresas kaj la intereso pri Esperanto kreskas ĉe laboristaro: antaŭ nelonge finiĝis kurso, organizita laŭ peto de unuigo de fervojistoj.

La 24 aŭg. L. E. S. estis aranĝinta sian unuan propagandan feston, kiu ebligis al la socio pliriĉiĝi ĝian bibliotekon. Post parolado okazis transdono de l' standardo al la socio, partoprenita de laborista kantoruso, kiu estas tiom entuziasmita pri Esperanto, ke ĝi propravole ellernis la esperantigitajn laboristajn kantojn. Sekvis du teatraĵoj, el kiuj unu estis tiukaze esperantigita de unu el la societanoj. Lastempe efunkociis la de la S. A. T.-grupo starigita Lingva Komitato, kiu celas akceli la tradukemon de progresanta kamaradoj kaj kontraŭbatali la fuŝojn kaj francisman, lastempe svarnizitan en la fakdonojn. Samtempe al la socio aliĝis ankaŭ la samgrupa Laborista Gazet servo. La socio (Tallinn, Vaksali p 8-a) volonte interrilatiĝas kun samcelaj organizoj. — En Pärnu (Pernau) la organiziginta kaj regule kunvenanta 6-persona grupeto „Batalo“ jam duan fojon klopodas pri oficialigo de l' statuto. Pro manko de sperta instruanto enloke, la socio en Tallinn aranĝas korespondan kurson, al kiu aliĝis jam ĉ. 15 lernantoj.

Rezolucio pri Esperanto.

La antaŭ nelonge okazinta kongreso de delegitoj de presistaj unuigoj alprenis interalie la proponitan rezolucion pri anstataŭigo de privilegiaj lecionoj per Esperanto. La fakto estas notinda, ĉar neniu esperantisto estis proponita la rezolucion aŭ partoprenanta la kunvenon. R. L.

Francojo.
Lille. Starigis komitato de Esp. Federacio de Norda Francojo sub prezido de D-o Vanveris, en la universitato de Lille, sek. s-o Notin, 18 rue d'Inkermann, Lille. Aliĝo venis el 13 lokoj.

Neogeni-sur-Marne. Kurso de s-o Odinet en Filo-tekna Asocio.

Orléans. La grupo ricevis honoran diplomon por esp. fakto en la Polro.

Paris. 24. 10. parolado de s-o Eyquem en la artista socio de fervojistoj.

Strasbourg (Elzaso). Du novaj kursoj. En Mulhouse parolado de s-o Schwartz ĉe malfermo de kurso la 13. 10. Pluaj kursoj en Schiltigheim, Reischhoff kaj Cronenburg.

Germanujo.
Bad Kreuznach. La grupo komencis kurson inter geinstruistoj kun 8 p., gvid. s-o Euler, instruisto.

Dresden. (Loka unuigo de GEA.) En la bonvizitata ĉefkunveno de 29. 10. legis la prezidanto la ĵarraporton kaj la kasisto la kasraporton. Post deŝarĝo de la estraro oni elektis kiel novan prezidanton unuvoĉe s-on Joh. Karsch, kiu akceptis kaj donis mallongan skizon pri la intencata venonta laboro. Novaj kursoj estas en la komercista grupo kaj en banko Arnhold. Alvoko pri partopreno al la fondo de la „Saksa Ligo“ en Chemnitz la 2. 11. La vesperon finis bona parolado de f-lino Kührn pri „Beleco de l' alpoj en vintro“ laŭ propraj spertoj.

Gohlis apud Dresden. La grupo de junaj geesperantistoj pruvis sian fervoron kaj diligentecon per la fakto, ke kvar junulinoj 15-17-jaraj (f-linoj Bernhard, Franz, Freyer kaj Sonntag) faris la ekzamenon pri lingva kapableco ĉe la Esp. Inst. por la Germ. Respubliko. Ili bonege sukcesis. Ne nur la multnombre vizititaj grupaj vesperoj, sed ankaŭ la „migradaj tagoj“ helpas la progreson de la viglaj ĝeunuloj.

Ankaŭ la ĉi-jara esp. klaso en la lernejo, instruita de s-o Hahn, laboras diligente. Nun ĝi preparas kiel kutime la „Esperantan Krismaskon“, kiu estas laŭ multjaraj spertoj la plej bona propagando por la fondo de la nova klaso. Esperanto vere vivas en la vilaĝo Gohlis.

Heilbronn. Du kursoj, unu kun 50 p. (gvid. s-o Bachmann) alia kun 18 polcistoj (gvid. s-o Kull). Kunvenoj de la „Esperanto konversacia rondo“ (Ekoro) ĉiun ĵardon vesperje ĉ. 8 h. en restoracio „Wenger“, Karlstr. 85. Ĉiun lastan ĵardon en monata kunveno de la loka grupo. Adreso de la L. G. ĉe la del. de UEA s-o Bachmann, Bahnhofstrasse 5.

Herne (Vesfalio). Ok artikoloj de s-o instr. Oehmig en la tri lokaj gazetoj kaj parolado de s-o Sandrock el Essen preparis la fondon por aranĝo de diversaj kursoj, kiuj nun okazas: 2 ĉe Popola Altlernejo (gvid. s-o Oehmig) kun ĉ. 50 p., inter ili 2 redaktoroj, 17 instruistoj, krome komercistoj kaj oficistoj; 2 por laboristoj kun ĉ. 70 p.; plus, 2 kursoj por progresintoj (unu neŭtrala, unu laborista). Fondo de grupo okazos dum vintro.

München. Propagandan paroladon de s-o Schmalz el Weiden en la universitato ĉeestis 150 personoj. La ĝenerala intereso por Esp. kreskas precipe dank' al la radiokurso. (Legu ankaŭ sub „Radio“!)

Neckarsulm apud Heilbronn. Post parolado pri Esperanto farita la 26. 10. de s-o Fr. Bachmann el Heilbronn Esperanto kurso kun 20 p. estas aranĝita (gvid. s-o Kimmeler).

Stettin. En „Vortrags- und Diskussionsabend“, aranĝita de la ĉi tiea grupo, s-o D-o Möbuser el Lübeck parolis antaŭ 500 personoj pri „Esperanto in Gegenwart und Zukunft“. Du gesamideoj prezentis esp. specimenojn el poezio kaj prozo, kaj longa diskuto, speciale pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, finis la bone sukcesintan aranĝon. — En du kursoj por komencantoj, gvidataj de rektoro Krieger, estas instruitaj 60 gesinjoroj. Vidu ankaŭ la rubrikon „Esperanto en Lernejo“!

Italujo.

Udine. Komence de jan. 1925 nia grupo inaŭguros sian flagon. La ceremonio okazos en ĉefa urba teatro kun ĉeesto de muzikantaro, reprezentantoj de italaj esp. grupoj kaj arto de aŭtoritatuloj. Parolados D-o Kav. Arturo Ghez, prez. de Esp. Rondo en Trieste. La tute afero certe havos plenan sukceson, kaj ni varme dezirus, ke ĉiuj esp. asocioj, grupoj kaj individuaj esperantistoj sendu al ni salutleterojn. Adreso: Esperanta Grupo Udine, Italujo. „Castro Roma“.

Voghera (Pavia). La 26. 10. ĉe la ĉi tiea Popola Teatro okazis publika parolado de Prof. Modesto Caroli pri „La triumfo de Utopio“. Sufiĉe multenombraj estis la ĉeestantoj, inter kiuj estis multe da ĝeinstruistoj. La 6. 11. ĉe la vesperaj komunumaj lernejoj oni malfermos Esperanto-kurson, al kiu jam multaj enskribiĝis.

Jugoslavio.

Bjelovar, Kroatujo. Spite al malfacilaĵoj, nia movado disvastiĝas sufiĉe bone en nia urbo. Estas malfermitaj tri novaj kursoj por komencantoj: unu en ĉambro de l' gimnazio, gvid. Prof. Schej, viceprez. de la klubo; alia por laboristoj en Lab. Domo, gvid. s-oj Kraljevic kaj Styblo; tria por burĝoj en knaba popollernejo, gvid. s-o Poljan. Kunveno de la klubo okazas ĉiudimanche. Dum pasinta somero estas aranĝitaj tri ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon.

Grohote. La nova kurso gvidata de s-o Jakov Mladin bone progresas. Ni intencas baldau fondi klubon, kiu estos la unua sur la dalmacia insularo.

Imotski. Per klopodoj de s-o A. Markota le esp. movado restariĝis ĉi tie je novaj fortoj.

Novi Sad. La samideanoj de Novi Sad sendis inviton al Sudslava Ligo, por ke la 3-a landa kongreso okazu en Novi Sad. K-do Emilio Michnyak gvidas bon sukcesan kurson por gelaboristoj. La 7. 10. estis kunveno de Esp. Lab. Rondo; oni decidis inaŭguri standardon okaze de la datreveno de l' naskiĝtago de D-o Zamenhof. La inaŭguro okazos la 14. 12. je 3 h. pm. Samtempe estos esp. ekspozicio, por kiu oni petas alsendi (als-ano Fr. Csauth, Pettefiva 5, Novi Sad) materialon, kiu estos laŭdeze resendata.

Sub gvidado de k-do Fr. Csauth kaj Michnyak okazis lastempe tri ekskursoj al famaj lokoj Sremski, Karlovci, Siražilo kaj Kamenica, partoprenis ĉ. 150 samideanoj.

La Esp. Lab. Rondo, kiu ekzistis nur depost unu jaro, havas jam 80 membrojn, kiu sufiĉe bone parolas Esperanton. Fr. C.

Split. Novan kurson por gelaboristoj kun 84 p. gvidas la meritplena sekretario de la loka klubo. En novembro oni malfermos du novajn kursojn: unu por inteligentularo kaj alia por virinoj. Tre bonan propagandon faras la ĵus aperinta broŝuro de D-o T. Velnici: „La problemoj de lingvo internacia kaj Esperanto.“

Rumanujo.

Bukureŝti. La bukureŝtan grupon vizitis franca s-ano A. Le Bihan, prez. de la grupo esp. en Le Mans, kaj pola s-ano Schmeizer, sek. de la klubo esp. en Lwow.

Radauti (Bukovino). La 1 okt. malfermiĝis nova bankoficista kurso, en kiu Esp. estas fako nedeviga. Lernas nian lingvon 40 p. Instruas s-o Edmund Jarosiewicz. Fondo de grupo estas preparata.

Targu-Mures. (Transilvanio). La ĵus malfermita kleriga kursaro sub la direktado de prof. Gabr. Szgyarto metis en sian programon ankaŭ kurson de esp. Estas rimarkinde, ke la esp. kurso havas la plej nombran vizitataron: 44 pers. Instruas prof. D-o F. Kadar.

Ruslando.

Serdobsko. (gub. Saratov). En nia malgranda urbo troviĝas ĉ. 20 ges-anoj. Inter loka ĝeunularo vigle propagandas f-ilo A. Novokresĉenov kaj f-lino N. Vitaŝeva.

Svedujo.

Esp. kurso en fervojista gazeto.

Stockholm. La redaktoro de porfervojista gazeto Svensk Järnvägstidning (Sveda Fervojista Gazeto), sin interesas pri Esperanto, petis artikolojn pri ĝi kaj ankaŭ deziris enpresi kurson en la gazeto. Li konstante disponigas unu aŭ du paĝojn de ĝi por la esperanta afero. La gazeto aperas 3-foje ĉiunmonate kaj estas sufiĉe grava kiel ankaŭ la organizo, kiu ĝin posedas, Svenska Järnvägarnas Personalförbund (Unuigo de oficistoj ĉe Svedaj Fervojoj). La adreso estas Hantverkaregatan 12, Stockholm.

Esperanto en Lernejo.

Belgiujo.

Verviers. La 26. 10. okazis en salono de „La Mutuelle“ solena disdono de premioj kaj diplomoj al ĝe-partoprenintoj de fakultativa esp. kurso en 4-a klaso de popollernejo (instr. s-o Racoux) kaj de perfektiga kurso (instr. s-o Jos. Héron). Samtempe okazis ekspozicio de ilustr. poŝtkartoj, lerejoj kaj manlaboraĵoj el trideko da landoj. Ĉeestis la solenan aranĝon s-ino Berkman, lerneja direktorino el Spa, s-ino Ach Simon, lerneja direktoro, kaj aliaj aŭtoritatuloj. Detale raportis pri la aranĝo „Le Jour“ de 28. 10.

Germanujo.

Gohlis apud Dresden. Pri la ĉi tiea esp. klaso en la lernejo legu sub „Kroniko“!

Schierstein a. Rh. En oktobro komenciĝis kurso por instruistoj en la popollernejo kaj por lernantoj de pli altaj lernejoj kun 8 partoprenantoj.

Stettin. Malgraŭ vigla kontraŭstaro de la plejmulto de la instruistoj, rektoro Krieger fondis specialan lernankurson en la de l' gvidata Otto-Schule (meza lernejo por knaboj); 55 lernantoj de la I-a kaj II-a klasoj partoprenas kun granda fervoro. Liaj penadoj formi esp. kurson ankaŭ por lernantoj de superal lernejo malsukcesis, ŝajne pro sekreta kontraŭstaro de la filologaro. — Ĉiun mardon okazas en la rektora ĉambro de Otto-Schule ekzercvespero por progresintoj, gvidata ĉiufoje de alia samideano.

Wiesbaden. Meze de oktobro komenciĝis en la ĉi tiea populuniversitato l' kurso por komencantoj kun 80 partoprenantoj kaj 2 kursoj por progresintoj kun 52 partoprenantoj.

Radio.

Bona rezulto de Radio-Esp. Kurso en München.

Oni informis nin, ke la esp. lernolibro, kiun rekomendis s-o Koch ĉe siaj radiolecionoj, estas mendita jam de 250 personoj.

NEKROLOGO.

F-lino Antonie Janalilková, fakinstruistino kaj vicdel. de UEA en Bystřice p. H. forlasis nin en septembro t. j. por ĉiam. Ŝi estis unu el la plej viglaj samideaninoj de nia movado en Moravio. Longe ŝi vivis en la memoro de tiuj, kiuj konis ŝin kaj ŝian noblan karakteron. Tiuj, kiuj havis la honoron esti instruataj de ŝi pri Esperanto, daŭrigos ŝian flamon kaj energion por plej baldaŭa interfratiĝo kaj paciĝo de la homaro. A. K.

S-o D-o Josef Kubiček, kuracisto en Olomouc mortis la 1 oktobro en aĝo de 52 jaroj. Li estis la unua prezidanto de esp. klubo, del. kaj poste membro de UEA. Dum du jaroj en malsanulejo, li ne plu povis aktive partopreni je nia laboro. La ĉi tiera samideanoj sincere bedaŭras lian tro fruan foriron. Liaj noblaj agoj por nia afero vivas plue. Lia nomo estas ligita al la historio de Esperanto en nia urbo. A. K.

Alvoko.

La muzeo de H. C. Andersen.

Alvoko al la tutmonda esperantistaro. La muzea estraro petis min havigi al la muzeo ĉiujn eldonajn nacilingvajn de l' fabeloj de la granda fabelisto Hans Christian Andersen, ankaŭ tiujn librojn aŭ gazetojn, kiuj enhavas artikolojn pri li.

Mi petas la tutmondan esperantistaron sendi al mi informojn pri la libroj kaj iliaj prezoj, kaj mi garantias ke ĉiuj estos pagataj.

Al la muzeo precipe mankas eldonaĵoj rusaj, ĉinaj, turkaj, aŭstraliaj, egiptaj, persaj ktp.

Samideanoj! estu al mi helpemaj, por ke mi povu almontri bonan rezultaton! Estu al mi helpemaj por pravi la utilecon de nia lingvo!

Bonvolu sendi viajn informojn al s-o H. Mad sen, St. Glasvej 23, Odense, Danujo.

Financaj informoj.

Unuigo de kooperativoj por militdonaĵoj.

Eldono 1922 (5%).

Eltirado de 10 oktobro 1924.

S 22478 N 13 repagebla je 250 000 fk.

S 64599 N 4 " " 100 000 "

S 22478 N 17 " " 100 000 "

La aliaj numeroj de tiuj serioj kaj ĉiuj numeroj de la serio 4409 estas repageblaj je 300 fk.

Eldono 1921 (4%).

Eltirado de 15 oktobro 1924.

S 156626 N 10 repagebla je 1 000 000 fk.

La aliaj numeroj de tiu serio estas repageblaj je 250 fk.

Eldono 1923 (5%).

Eltirado de 20 oktobro 1924.

S 341370 N 3 repagebla je 100 000 fk.

S 24614 N 1 " " 100 000 "

S 251260 N 2 " " 50 000 "

S 278430 N 3 " " 50 000 "

S 17259 N 2 " " 50 000 "

Estas repageblaj ĉiu je 10 000 fk. la titoloj:

S 379120 N 1 S 308808 N 1 S 99285 N 3

S 101947 N 4 S 53347 N 3 S 177449 N 2

S 265557 N 5 S 134871 N 3 S 75085 N 2

S 10738 N 5 S 13238 N 2 S 389283 N 4

S 279521 N 3 S 166603 N 4 S 39292 N 5

La aliaj numeroj de la suprecititaj serioj estas repageblaj je 550 fk.

La repago okazas pere de la Nacia Banko de Belgio.

Negoca informo.

„Ibosan“

estas novaĵo de la medicino, preparato nepre efektika kontraŭ Diabeto. Ĝi havas la econ, liberigi kaj eksigi el la korpo la malsanigaĵojn, sed tute alie ol la ĝisnuna diabeto terapio postulis, nome malkonsiderante preskaŭ ĉian dieton. Post komence ŝajna malboniĝo de la simptomoj ekestas rapida foriĝo de la malsano kaj komenciĝas radikala resaniĝo. — Atentu la anoncon!

IBOSAN

nepre certa helpilo kontraŭ ankaŭ bonege efikas kontraŭ malbona digestado, abscesoj, haŭtmalsanoj, infektaj malsanoj kaj kontraŭ ĉiuspacaj malsanoj de asimilado. - Eksterlandaj agentoj estas dezirataj. Ĉiuj mendoj estos plenumataj de s-o

Neuber, Potsdam Lindenstr. 34a Germanujo.

Artaj oleo-pentraĵoj.

Kopioj de klasikaj kaj modernaj famaj majstroj, similegaj al la originaloj. Specimena pentraĵo sur ligna kadro estas sendata kontraŭ antaŭpago de 1.— dolaro aŭ egalvaloro.

E. Heyn, Dresden-Loschwitz, Germ. Esperanto-fako, Ludwig-Richtersstr. 6.

Kondiĉoj de aĉto je kredito de tiaj obligacioj*, kiuj ĝuas procenton de 10 fk. (1921 4%), 12,50 fk. (1922 5%) aŭ 25 fk. (1923 5%) kaj kies procento kaj repago estas

garantiataj de la belga ŝtato.

Table with 5 columns: Pajoj, Eldono 1921, Eldono 1922, Eldono 1923, Eldono (unu de ĉiu eldono)

De la nuna pago subskribanto estas sola posedanto de la titolo (i), plenarye partoprenas la eliradojn kaj ĝuas la procenton. — Subskribu sendante vian unuan pagon per internacia poŝtmandato

F. Bormans, Rubensheide 52, Capellen (Antv.), Belgujo.

* Vidu la „Financan Informon“ en la hodiaŭa numero!

Por efektivo de naci-economia kaj financ-sciencia problemo

ni organizas en monato januaro 1925

Vojaĝon de studo kaj orientiĝo

al Egiptujo kaj speciale al la regiono de Sinajo. Tre grava afero por financistoj kaj firmaoj. Sinjoroj kaj sinjorinoj interesigantaj pri koncernaj detaloj senpage ricevas informojn de

G. Dubach, Bissone-Lugano, Svislando.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok BT-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas denove preni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propraj anoncetoj preferan prezon de kvin BT-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-oj Leopold Goldberger el Krakow naskiĝis la 7 oktobro forta filo nomita Adam. [1]

EDZIĜO. S-o Vasilie Morariu, M. de UEA el Ĉiuj (Transilvanio, Rumanio), la 18 sept. edziĝis kun f-lino Agnes Bartos en Lunca de-Milloc (Gyimesközéplek), Transilv., Rum. [1]

DOKTORIĜO. Nia estimata samideano Aldo Conti obtenis en la Reĝa Politeknika Lernejo de Torino honoran doktorecon kiel industria-mekanika inĝeniero. — Al la nova inĝenierio, la torinaj samideanoj sendas la plej varmajn gratulojn kaj bondezirojn. [1]

DANKO! Al la familio Lodezera en Antverpeno ni transportas nian tutkoran kaj respekteman dankon por la gastemeco dum 5 tagoj. Ges-oj J. T. Kaptein, Helder. [1]

DANKO. S-o Léon Agourine el Paris dankas por afabla akcepto ges-ojn Borekman kaj Desonay en Spa kaj s-on Oger en Liège. [1]

DANKO al ĉiuj, kiuj estas sendintaj gazetojn por nia ekspozicio! Esperanto-Societo Potsdam. [1]

ADRESOŜANĜO. „La Verda Lumo“, la oficiala organo de hina esperantistaro, nun havas novan adreson: P. O. B. 135, Shanghai. [1]

ADRESOŜANĜO. Al miaj gekorespondantoj denove mi scigas, ke mi ne plu estas en Hindujo. Mia nuna adreso estas J. T. Kaptein, Westgracht 74, Helder (Nederland). Do ne plu en Hindujo! [1]

MONTECATINI (Italujo). La du gesamideoj, kiuj alvenis al Montecatini, la 14 aŭgusto matene, el la Vienna Kongreso, kaj kiujn mi ne povis plu revidi, post nia momenta renkonto en la stacidomo, estas petataj ĝentile sendi al mi siajn adresojn: S-o Cesarini Fidia, del. de UEA, Potenza (Italujo). [2]

KOMERCOFICISTO, 38-jara, plej bonaj atestoj, serĉas unu ajn laboron. W. Duregger, Traunstein, Scheibenstr. 26, Bavario. [1]

POLLANDA KOMERCA ARGENTEJO Warszawa, Krak-Predm. 10, Adolfo Oberroiman, deziras eniri seriozajn komerciantojn kun gravaj firmaoj, kiuj deziras vendi al ĉiuj reprezentantoj en Pollando, aŭ eventuale malfermi 15 stokon por povi pograde vendi la komercaĵojn. [1] PETO! La tero estas fruktodona. Sed ni devas havi semon. Sen semo, sen materialo por semi ni nenion povas. Do, ĝi petas samideanojn kaj redakciojn, ke ili sendu malnovajn numerojn de gazetoj kaj fratinoj japanaj ni petas sendi ankaŭ ion al ni. Pk. bfl. Sendu al: Pavas Dravoi, plekristo, Daruvar, Jugoslavio. [1]

LETERVESPERO estas aranĝota 25 novembro por pravi al niaj samubanoj, kiom estas disvastigita Esperanto. Ĉiu leganto estas petata sendi almenaŭ PK Respondon ricevos, kiel eble plej baldaŭ, ĉiu sendinto. Adresu nur: Grupo Esperantista de Orebro, Svedujo. [1]

REKOMPENCO DE 5 ŜILINGOJ (aŭ 5 ormarkoj) por unu ekzemplero de „Esperanto Triumfonta“ (n-o 2). Urĝege Siret, Londono, W. C. 1. [5]

ESP. KONCERTO PER RADIO okazos la 16 novembro, 11.40—12.40 h. de stacio Königsplatz en aŭstria eksterlando skribu al Esp. Grupo, Berlin SW. 61 Wilmsstr. 5. [2]

POR ZAMENHOF MONUMENTO. En fino de novembro oni intencas aranĝi vastegan esperantan ekspozicion en granda ekspozicia salono; oni insistas precize ĉiujn samideanojn se eble iuj alsendi diversajn reklamilojn, afiŝojn, gvidlibrojn, ornamaĵojn, gazetojn ktp. por plibonigi la ekspozicion, la tuta enspezo iros al la Loka Monumenta Komitato, la sendaĵojn oni alsendu al la del. de UEA samideano A. Oberroiman, Warszawa, Krak-Predm. 10. [2]

TIU SAMIDEANO, kiu sendis al mi anglan revuon „Auckland Weekly News“, estas petata skribi sian adreson al mi, por ke mi povu respondi laŭ liaj deziroj. Sed ĉar la poŝtmarko estas stelia, bonvolu scigi min per rekomendita poŝto. Erich Tauth, Neulässig 1, Post Felhammer 1, Schlesien, Germanujo. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Deziras korespondi kun tuta mondo jenaj junuloj 17—18-jaraj: Hainski, (adreso: Ĝubfo, al Kriukov), Kresik (Ĝubfo, al Kriukov), Egorov (Ĝubfo, al Kriukov), Moskvin (adreso: Ĝubfo, al Kriukov), ĉiuj el Irkutsk, Rusio [1]

S-o M. Wieland, Horrem bei Köln, Ĝermanujo, deziras korespondi kun gesamideoj ĉiulandaj per il. PK kaj L. [2]

Mi anoncis jam pri deziro korespondadi kun gesamideoj ĉ. l. per il. PK (bfl.). PM kaj papermono, sed ankoraŭ nenion ricevis. Gesamideoj bonvolu skribi al mi. Respondo estas garantiata. Mia ĝusta adreso e: s Tomilov Anatolj, Uprofbjuro, Petroŝki-Zavod, Zabajkalskoj gub., Siberio, Rusujo. [2]

S-o R. Schönwälder, Hermannseifen, Bohemio, deziras korespondi kun gesamideoj en pli proksimaj landoj. Mi celas ĝoigi miajn gekursantojn per sciigoj pri landaj aferoj. Ankaŭ biletkartoj, poŝtkartoj k. a. deziratoj. Al ĉiuj ni respondas. [2]

Felnagy Johano, meĥanikisto, Lipset, Nyar str. 89, Hungarujo, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj, escepte Germanujo, per il. PK aŭ L. [2]

Hector Vermuyten, Grétrystraat 53, Antwerpen (Belgujo), interŝanĝas nur ideojn kaj observojn. [2]

Nikolaj Wieremicko, poez. Snów, pow. Nieswiecki, folw. farejki, Polujo, deziras interŝanĝi il. PK kun interesat vidindaĵoj kun amikoj de la tuta mondo: mi certe respondas ĉiujn skribaĵojn. [2]

S-o Alfred Kirsch, Chemnitz i. Sa., Augsburgerstr. 53, Germanujo, deziras interŝanĝi il. PK kun eksterlandanoj. [2]

Jugoslavajn, bosniajn, hungarajn PM mi sendas por ĉiujn laŭ katalogoj Yvert aŭ Michl. Ne sendas unue. Ne deziras bagaĵojn. Béla Spitzer, Del. de UEA, Subotica S. H. S., Jugosl. Holzwaren-Fabrik. [1]

S-o Felix Ziemann, instruisto, Rotschäufel-Reichenbach i. V. Germanujo, deziras korespondi kun eksterlandanoj per il. PK bfl. kaj L. pri iuj temoj (socia vivo, pedagogio) ĉiam tuj respondos. [2]

S-o W. Lorenz, pormetia instruisto, Reichenbach i. V., Germanujo, deziras korespondi kun eksterlandanoj per il. PK kaj L. pri iuj temoj, ĉiam respondos. [1]

S-o Franz Petter, Falkenau-Kittlitz n-o 21, deziras interŝanĝi L. PK, PM, escepte kun germanoj. [1]

S-o Wladyslaw Zdaniewicz, poezia Wiel. kie Solecznikzi ziami Wileŝkiej, Pollando deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. PK kaj L. ankaŭ interŝanĝi papermonojn kaj PM, ĉiam respondos certe. [1]

Partoprenintoj de komencanta kurso post finstudo deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per L. kaj k. il. Skribu al s-o Cuk Simoni, komercisto, s-o Leo Suma, studento, s-o Dardo Suma, studento, s-o Loro Gionej, studento, s-o Ernesto Koligi. Adresoj por ĉiuj urbo: Skhodër (Skutari), Albanio. Sendu nur seriozajn aferojn. [1]

Mi deziras konstantan korespondadon, nur kun tiaj, kiuj scias Esperanton bone, escepte german-, franc- kaj anglalingvanojn. Precipe kun tiuj, kiuj estas interesataj pri religio, sporto kaj naturscienco. Mi kolektas postmarkojn. Eric Carlien, Fack 698, Stockholm 1, Svedujo. [1]

Por 100—500 poŝtmarkoj de la tuta mondo, mi donas saman kvanton de mia lando. Por pli bonaj mi donas bosniajn, albanajn kaj montenegrajn pm. Mi ne akceptas pli multe ol 2 ekz. de sama speco. De germanaj mi bezonas nur koloniajn kaj plebsciantajn. [1]

Rudolf Bresslauer, Daruvar, Jugoslavio, Eŭropo. [1]

Diversaj gegrupoj de la Heilbronner Esp. Grupo serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Ĉiam kaj tuj respondos. Oni turnu sin al la prezidanto s-o Fr. Bachmann, Bahnhofstr. 5-1, Heilbronn a. N. (Germ.). [2]

D-o V. Bruck, redaktoro ĉe la „Institut International d'Agriculture“, Villa Umberto I, Roma, deziras konatiĝi kun ĉiulandaj gesamideoj travojaĝantaj Romon. [2]

S-o Albert Lindshöm, Hanrövögen 8, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per L. kaj il. PK. [2]

S-o Gustav Ahlberg, St. Johannes gatan 26, Upsala, Svedujo, deziras interŝanĝi il. PK. [2]

Karaj samideanoj! Mi tre bedaŭras, mia frato Kosabro Simura estas malsana, tial mi petas, paŭze korespondon ĝis resaniĝo. F-lino Natsu Simura, 49, Janagicho, Tojama, Japanujo. [2]

Tutmondaj filatelistoj! Kontraŭ 50—100 PM de via lando mi sendas samkvanton de mia lando. Mi serĉas seriozajn interŝanĝantojn. Richard Horatlik, Kumzak 143, Ĉeĥoslovakio. [2]

Victor Herregodis, Géomètre du Cadastre, Herzele (Belgujo), deziras interŝanĝi PM kaj korespondi kun aliaj landoj. [2]

S-o Max Pejold, Nestschkaŭ i. Vogtl., Bahnhofstr. 14, (Germanujo) deziras korespondi kun eksterlandanoj pri ĉiuj temoj per il. PK kaj L. Mi certe respondas ĉiam skribaĵojn. [2]

Junaj, bela f-lino deziras korespondi per il. PK bfl. kaj interŝanĝi personajn fotojn kun gesamideoj. Respondo garantiata la loka UEA-del. Ada Rabinowicz, m. Hoszcza p. Równe (Pollando). [2]

Anoj de laborista grupo deziras korespondadi kun la tuta mondo, escepte Germanujo, per PK kaj L. Adresoj: Munkás Esperantisták, Szeged, Maros-u. 4, Hungario. [2]

FER-MAGAZENO
ŝraŭboj ĉiuspacaj, dratsifitoj.
Eksremaj prezoj. Postulu oferton!
Hermann Dix, Zeulenroda Turingio Germanujo.